



Balenido

Dimanĉo, la 3-a de julio 2016

N-ro 2

Salutmesaĝo de la urbestro



Esperanto estas gepatra lingvo por neniu nacio. Ĝi estas kvazaŭ ponto, kunliganta diversajn kulturojn kaj apartenanta al ĉiuj homoj. Sciante Esperanton Vi povas trovi amikojn en la tuta mondo. Ekzemple, korespondante kun esperantistoj el malproksimaj, ekzotikaj landoj, Vi povas konatiĝi kun tieaj kulturoj. Se Vi amas vojaĝi, Vi povas uzi la adresaron “Pasporta Servo”. Esperantistoj el pli ol 70 landoj publikigas en ĝi siajn adresojn. Ili afable gastigos Vin kaj donos al Vi senpagan tranokton. Kaj eble ili eĉ montros al Vi sian urbon aŭ landon.

La unika naturo de Birštonas, meandraj kurbiĝoj de la rivero Nemano, reĝa historio de la urbo, kaj sanigaj natur-riĉaĵoj, estas tiuj valoraĵoj, pri kiuj ni fieras kaj invitas ĝui ĉiujn – birštonanojn kaj gastojn de la banurbo.

Interkomunikiĝu, devove malkovru la unikan regionon de Birštonas, konatiĝu kun ĝiaj kulturo, tradicioj kaj heredaĵo, enhavoriĉe pasigu la tempon, uzu sanigajn servojn kaj distraĵojn de aktiva ripozo. Mi kredas, ke ĉi tie Vi spertos ne nur belajn momentojn, sed Vi bonfartos harmoniaj, sanaj kaj, kompreneble, feliĉaj. Mi bondeziras al Vi agrablan gastadon kaj bonajn emociojn. La gastama Birštonas ĉiam atendas Vin!

Urbestro de Birštonas
Nijolė Dirginčienė

Programo

La 4-a de julio (lundo)

- 08.00 – 09.00** Matenmanĝo (Mangejo)
- 09.00 – 10.00** **Somera Universitato.** Prof. Aloyzas Gudavičius: Prelegciklo pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (Ĉefsalono)
- 09.00 – 10.00** **Somera Universitato.** Prof. Ilona Koutny: “Esperanto en interkultura komunikado” en salono de la gastejo “Birštono tulpè” (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo).
- 09.00 – 10.00** **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29).
- 10.00 – 10.45** **Somera Universitato.** Prof. Walter Ŝelazny: Prelegserio pri bazaj elementoj de judaismo (Ĉefsalono)
- 10.45 – 12.15** **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29).
- 11.00 – 10.45** **Somera Universitato.** Prof. Walter Ŝelazny: Prelegserio pri bazaj elementoj de judaismo (Ĉefsalono)
- 12.00 – 12.45** **Somera Universitato.** Anna Striganova: Lingvo de fabeloj aŭ samaj motivoj en fabeloj de diversaj landoj, en “Birštono tulpè” (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo).
- 12.00 – 12.45** **Somera Universitato.** Prof. Aleksandr Melnikov: Eĉ esperantistoj kapablas ŝerci (pri vortludoj en Esperanto) (Ĉefsalono)
- 13.00 – 14.00** **Tagmanĝo** (Mangejo)
- 14.30 – 15.15** **Somera Universitato.** Prof. Marian Dobrzyński: Pri psikopatio (la 1-a parto) (Ĉefsalono)
- 15.30 – 16.15** **Somera Universitato.** Prof. Marian Dobrzyński: Pri psikopatio (la 2-a parto)
- 15.30 – 16.15** **Somera Universitato.** Janusz Pokrzywnicki: Defendaj konstruaĵoj de la deknaŭa jarcento. Malfacila heredaĵo en “Birštono tulpè” (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo).
- 18.00 – 19.00** **Vespermanĝo** (Mangejo)
- 20.00 – 21.00** **Spektaklo** de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik (Kurhauzo, B. Sruogos 2)

Teatro Verda Banano: La Kredito de Jordi Galcerán



Unuavide banala historio. Al banko venas kliento, kiu petas krediton. Tamen li ne havas ajnan garantiĵon. Kiam direktoro de la banko rifuzas doni al li la krediton, la kliento elpensas nekutiman formon de ĉantaĝo. Temas pri virino, sed por scii pli, vi devas mem viziti la spektaklon.

La kredito estas inteligenta teatraĵo kun viglaj dialogoj kaj turnopunktoj aperas de la komenco ĝis la lasta sceno. Unu el la aktoroj, ludinta en la hispana versio, diris: „Se ni farus paŭzon ĉiufoje kiam la publiko ridis, ni neniam finus la spektaklon.”

La Kredito, verkita en la jaro 2013 de la fama hispana dramverkisto Jordi Galcerán, estis prezentita en Hispanio, Argentino, Grekio, Meksikio, Panamo, Finnlando, Peruo, Germanio, Aŭstrio, Ĉilio, Hungario, Italio, Pollando kaj nun Litovio.

Traduko: Georgo Handzlik, kun helpo de Rubi Birden.

Reĝisoris: Kuba Abrahamowicz.

Aktoras: Saša Pilipovic – Antonio,
Georgo Handzlik – Direktoro.

Georgo Handzlik, “Bardo sen barbo”, Esperanta instruisto, poeto, kantisto, aŭtoro de kantoj, aforismoj, dramoj koncertis en 26 landoj. Propran monodramon



Ludoviko-Lazaro, preparitan por Bjalistoka UK, li mem aktoris 27-foje en 15 landoj, verŝajne rekorde en la historio de la Movado.



Saša Pilipović, profesia aktoro en la plej malnova serba teatro en Kragujevac. Li laboris kiel parolisto en Esperanta elsendo de Radio Zagreb, aktoris Esperante dum UK-oj en Havano, Monpeliero, Zagrebo,

Fortalezo, Geteborgo, Vilno, Jokohamo, Roterdamo, Kopenhago, Hanojo, Bjalistoko, Rejkjaviko. Fondinto de “Shelter-sceno” kaj “Societo Espero Kragujevac”.

Folkloraj koncertoj

Kadre de Nacia Vespero dimanĉe tage post solena inaŭguro koncertos en la urba Kulturcentro du lokaj ensembloj: Lendrūnas kaj Raskila.

La popolmuzika ensemblo Lendrūnas ludas verkojn de litovaj komponistoj kaj aranĝitajn popolajn kantojn. La ensemblo strebas konservi la muzikilan konsiston de tradicia popolmuzika ensemblo. Lendrūnas partoprenas en diversaj regionaj kaj respublikaj festoj kaj konkursoj por popolmuzikaj ensembloj: en Jurbarkas, Nida, Varėna, Utena, Anykščiai, Širvintos, Trakų Vokė, Lazdijai, Kaŭno, Kelmė.

La gvidanto de la ensemblo estas Algimantas Jazbutis. La popolmuzika ensemblo estas honorita per la premio La Ora Birdo (*Aukso paukštė*) – la plej alta honoraĵo por litoviaj amatoraj artkolektivoj kaj ties gvidantoj.





Per popolaj kantoj, dancoj, muziko, ludoj kaj rakontoj refreŝigi siajn korojn kaj tiujn de apudestantoj – estas la celo de la ensemblo Raskila. Ĉar en la ensemblo estas ne nur loĝantoj de Birŝtonas, en ĝia repertuaro estas diversperioda muziko el diversaj etnografiaj regionoj de Litovio. Tamen la plejparto de la repertuaro estas folkloraj trezoroj de la suda Litovio. La popola muziko estas ludata per harmoniko, violonoj, tamburo, litovaj popolaj blovinstrumentoj *lumzdelis* (fluto), *birbine* (zumblovido).

Raskila dum 25 jaroj de sia agado partoprenis en multaj famaj aranĝoj – kantfestoj de litovoj de la mondo, festivaloj “Skamba skamba kankliai” (Sonas sonas kankloj), “Dzūkų godos” (Revoj de dzukoj), “Plaukia sau laivelis” (Jen flosas la boato), “Atvažiuoja žolynai” (Alveturas floroj), internaciaj folkloraj festivaloj Baltica, Europeade. Ĝi koncertis en diversaj landoj, internaciaj aranĝoj kaj festivaloj. La ensemblo estas ofte invitata koncerti kaj gvidi vesperkunvenojn en diversaj aranĝoj. Nuntempe en Raskila muzikas 19 partoprenantoj. Ili aĝas de 14 ĝis 45 jarojn. La ensemblon gvidas Roma Ruočkienė kaj Algirdas Seniūnas. En marto 2015 al la kolektivo estis enmanigita premio La Ora Birdo.

Estas interese, ke la nomoj de la du ensembloj estas botanikaj. *Lendrūnasestas kalamagrostido* (Latine: *calamagrostis*, Ruse: *вейник*), kaj Raskila estas alchemilo (Latine: *alchemilla*; Ruse: *манжетка, ростлик*).

Tradukis el la litova lingvo Antanas Grincevičius (La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/2016/05/bet-52/>)




















PEKSESO

En la libroservo de BET-52 havas premieron nova ludo por infanoj kaj plenkreskuloj (utila ankaŭ kontraŭ Alzheimer-malsano! :-).

Pekseso *Esperanto per rekta metodo* estas didaktika helpilo – kartludo por minimume du ludantoj. Ĉiu el la 12 numeroj konsistas el 48 ludkartoj, kiuj kreas duopojn. Celo de la ludo estas trovi egalajn duopojn. Eltondu la kartojn, miksu kaj dismetu ilin inverse sur la tablo. La unua ludanto turnas du kartojn. Se ili estas egalaj, li prenas ilin kaj daŭrigas. Se ne, daŭrigas la dua ludanto. La ludo finiĝas, kiam ĉiuj karto malaperas. Venkas tiu, kiu havas plej multajn duopojn.

Tiu ĉi peksejo enhavas bildojn de la lernolibro *Esperanto per rekta metodo* de Stano Marček. La lernolibro, kiun ilustris Linda Marčeková, aperis jam en 38 lingvoj, kaj elŝuteblas ankaŭ kiel aplikaĵo por telefonoj! Ĝi troveblas ĉe: www.iei.nl/apo.htm

Pekseso „Esperanto per rekta metodo“ 1

 mi	 vi	 kato	 ĉevalo
 tablo	 libro	 rozo	 pomo
 homo	 tabulo	 seĝo	 krajono
 plumo	 hundo	 La libro estas sur la tablo	 sidas
 staras	 planko	 li	 ŝi
 Kia? Nigra (tabulo)	 Kia? Blanka (papero)	 Mal- Granda domo, malgranda domo	 Kia? bela – malbela

Litova himno

La 6-an de julio (meze de BET) estos tre grava litova ŝtata festo – Tago de la ŝtato (kronigo de la Litovia reĝo Mindaugas). Jam dum kelkaj jaroj lige kun tio estas jena bela tradicio: tiutage je la 21-a horo vespere litovoj en la tuta mondo, kaj aliaj, kantas litovan himnon en diversaj publikaj lokoj. Ankaŭ en Birŝtonas en parko de Vytautas estos publike organizita kantado de himno de Litovio. BET-anoj aliĝos al tiu kantado! Ni publikigas tekston de la himno de Litovio, ĉar ne multaj konas la tekston parkere, des pli en Esperanto. El la litova lingvo ĝin tradukis Petras Čeliauskas.

Vincas Kudirka (1858 – 1899)

Nacia Glorkanto

(Ŝtata himno de Litovio)

*Litovi', patrujo nia, lando de gloragoj,
Viaj filoj ĉerpu forton el pasintaj tagoj.
Iru via infanaro nur laŭ virta vojo,
Ĝi laboru por bonfarto kaj por homa ĝojo.*

*Hela sun' de Litovi' obskurecon pelu for,
Por klerec' kaj justec' age ni fervoru.
Amo al litova ter' brulu ĉiam en la kor',
Kaj por vi, Litovi', unueco floru.*

Ĉu du nomoj por la sama rivero?

La internacia kultura aranĝo BET-52, okazanta en Birŝtonas, diskonigas tra la Esperanto-mondo ne nur la urbon, sed ankaŭ la riveron, ĉe kiu situas la urbo. Kiel ni nomu la 937 km longan riveron, kiu fluas tra iama prabalta teritorio, nun tra sudaj Bjelorusio (463 km) kaj Litovio (474)? La litova nomo estas *Nemunas* (akcentu la unuan silabon). Niaj baltaj fratoj latvoj nomas la riveron *Nemuna*. La praloĝantoj de nuntempa Kaliningrada regiono (Litovio Minora) nomis la riveron *Nemuns*, *Nemuna*, *Nemonas*. Krucmilitistaj kronikoj ĝin nomis *Niemen* (la riverfinan parton *Memel*). La svedforma nomo estas *Njemen*.

La rivernomo en slavaj lingvoj varias. Ĉe ukrainanoj *Nemon*, ĉe bjelorusoj *Njoman*, ĉe poloj *Niemen*. Rusoj la riveron nomas *Neman*. En PIV troveblas la rusdevena formo *Nemano*. La PIV-an formon ni povus trakti rekomena (ĝi ne estas deviga, fundamenta, oficialigita, kiel ekz., la nomoj Parizo, Varsovio). Sed jen estas interesa detalo. Laŭ PIV temas pri rivero, kiu

„trairas Belorusion“. Kiel la rivero atingis Litovion PIV-aŭtoroj ne rimarkis kaj eble tiel „permesis“ (?) al litovaj esperantistoj decidiĝi pri nomformo de „sia“ riverparto. Laŭ mi la esperantigitan formon de la tuta rivero oni devis derivi de la baltlingva formo al *Nemuno*. Sed du E-nomoj por la sama rivero? Kial ne? Jen, el Belorusio fluas flankrivero de *Nemunas*, kies litovan parto oni nomas *Neris*, sed la belorusan *Vilija* (la nomo, tamen, ne estas slavdevena!).

Preskaŭ en ĉiuj lingvoj konserviĝis la antikva unua prabalta silabo „nem“. Multaj baltistoj esplikas ĝian prasignifon „trankvila flukurbigo“ (kvieta meandrado). Kiel ajn, ni memoru, ke litovoj mem la riveron nomas *Nemunas*.

Vytautas Šilas

Vivu la verda stel'!

Kial en la 21-a jarcento ni ĉiam pli malofte publike aperas kun la verda stelo? Onidire, unu el la kaŭzoj estas evito de islamo, kiun iuj tute senpripense adekvatas al terorismo. Por islamaj (arabaj) landoj la verda stelo estas simbolo de potenco, batalo. Por esperantistoj la verda stelo simbolas esperon kaj konkordon. Ni ĝin havas sur blanka angulo de la verda standardo. Verdan kvinpintan stelon ni rimarkas ankaŭ sur flagoj de iuj islamaj ŝtatoj. Kies surflaga stelo estas pli malnova? La esperantista – ekde la jaro 1905! La unua „islama“ verda stelo, malplena (kontura) aperis sur la flago de Maroko nur en 1915. La plenaj steloj – multe pli poste. Ekzemple sur la stadardo de Sirio en 1946, sur tiu de Senegalio en 1960.

La verda stelo, kiel insigno, samkiel la verda Esperanto-standardo, estas unu el rimedoj por demonstri nian eksterordinarecon. Ĝi ne estas ia magia signo, sed historia simbolo, kiu invitas – homoj, estu kune, komprenu unu la alian! Kiam oni nenion legas kaj aŭdas pri Esperanto kaj esperantistoj – de kie oni eksci, ke Esperanto kaj esperantistoj (uzantoj de la lingvo) ekzistas ankoraŭ? Tamen ĉiu ja povas porti surbruste verdan steleton, la simbolon de Esperanto kaj tiel manifesti: Esperanto vivas – antaŭ vi estas viva esperantisto!

Vytautas Šilas

Ĉu vi volas kontribui al *Balenido*?

En *Balenido* vi trovas aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de la programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-52, fotojn k.s. La enhavo dependas ankaŭ de la kontribuoj de la BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj (eks)kursoj ktp, kaj poste aŭ metu siajn kontribuojn en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete al: stano.marcek@gmail.com. Ankaŭ kvalitaj fotoj estas bonvenaj, same kiel pri-BET-aj anekdotoj kaj rakontoj.

Stano Marček, via redaktoro